



Estrara Komunikado EKO 2017-11 sendita el Budapeŝto, la 28an de aprilo.

Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alskribaĵoj kun indiko de fonto: EKO de UEA

-----0000-----

Jen prepara teksto por AMO 34, kiu okazos en Vroclavo, Pollando post 15 tagoj.

Denaskaj esperantistoj

Ni imagas en iu momento ekzistas ĉ. mil denaskaj esperantistoj aktivantaj aŭ vivantaj. Tio reprezentas etan onon de la Esperanta parolkomunumo – situacio maltipa por la plimulto de la naciaj lingvoj.

Kiel oni efike kreas denaskan esperantiston?

Bebo bezonas riĉan kaj densan lingvan sperton, ĝia maniero elformi regulojn kaj ĝustan uzon bezonas grandegan kaj kontinuan aliron al paroloj en praktikaj kunteksto. Per laŭtlegado de vespera fabelo al bebo aŭ infaneto oni ne atingas la celon. La diraĵoj devas esti ligeblaj kun iu ago aŭ iu objekto aŭ kvalito.

Tipe kunestas du- aŭ plur-lingveco – estas periodo, kiam la etulo ne povas distingi laŭ lingvoj -- estas simple du vortoj por tiu objekto – eventuale temas pri Paĉjo-vorto kaj Panjo-vorto. La koncepto de diversaj lingvoj sekvas poste – tipe ekde la aĝo de 3 jaroj. Povas do esti mallonga periodo, kiam la paroloj kreas grandan lingvan mikson, kun vortoj el du lingvoj miksitaj aŭ eĉ afiksoj kaj aliaj elementoj miksitaj ene de vorto. Iuj gepatroj ektimas je tiu punkto kaj rezignas, aŭdante tiujn lingvospagetojn. Oni ne timu, tiu periodo baldaŭ pasas.

Mitoj pri denaskaj esperantistoj

Denaskaj esperantistoj ne faras konscian decidon okupiĝi pri Esperanto.

Povas esti, ke por komunikado denaskuloj ne faras konscian decidon. Ili ligas difinitan lingvon al difinita persono, kaj defolte uzos tiun lingvon por komuniki kun tiuj homoj. Sed necesas konscia decido en iu momento (eble ĉ. la aĝo de 12 jaroj) plue uzi la lingvon, kaj des pli por eniri la komunumon – t.e. partopreni renkontiĝojn, aŭ eĉ aktivi movade.

Denaskaj parolantoj ĝuas enorman avantaĝon

Tio sendube validas por naciaj lingvoj, sed por Esperanto la avantaĝo estas nur ioma. Ene de triaĝuloj, rikoltas grandajn aplaŭdojn la pruvebla aserto: ‘Esperanto estas lingvo, kiun vi povas sukcese eklerni en ajna aĝo’. Absolute eblas, ke iu kun ioma lingva talento eklernu Esperanton en aĝo de pli ol sesdek jaroj, kaj atingu nivelon kompareblan kun tiu de denaska parolanto. Tio praktike maleblus ĉe ajna nacia lingvo. Veras, ke denaskaj esperantistoj tendencas uzi la lingvon tre flekseble,

ekspluatante la latentajn ecojn de la lingva strukturo. Sed ili ne nepre ĉiam parolas senerare. Tio dependas de la kvalito de la aŭditaj lingvaĵoj tra la formadaj jaroj, kaj la posta preteco konscie mem studi la gramatikon kaj la intenseco de uzado de la lingvo. Krome, juna denaskulo povas kapabli je flua parolo, sed ne kapabli skribi la lingvon senerare.

SMG: Mia propra situacio: kvar generacioj

En nia familio, la generacia fluo tamen ekis je la dua generacio. Mia patro renkontis Esperanton en Auckland, Nov-Zelando, en studenta aĝo, per brokanta lernolibro. Post iom da jaroj, li vidis reklamon por la urba E-societo kaj unuafoje konsciis, ke en la lando estas veraj parolantoj, kaj ke eblas eĉ en la unua vizito interparoli en la lingvo. Poste, li parolis la lingvon al mi tra miaj unuaj jaroj, kaj menciis ĝin al mia avino, kiu memstare lernis ĝin. Siavice, mi parolis ĝin al niaj du pli aĝaj filinoj, per tio ni havas kvar generaciojn de Esperantismo. Ankoraŭ nun Esperanto estas ilia defolta lingvo, kiam ili alparolas min, eĉ se ili ne multe uzas la lingvon aktive.



Entuziasmuloj en la Internacia Infana Kongreso en Danlando en 2011.

Por diskuti

- Kiel kuraĝigi E-familiojn teni la lingvouzon aktiva?
- Kiel spertigi al denaskuloj la E-komunumon?
- Kio estas la rolo de REF (Renkontiĝo de Esperantistaj Familioj – foto sekvaĝe), de la Infanaj Kongresetoj (foto supre), de ILEI, de UEA?
- Kiu plia praktika helpo povus utili por E-familioj kun denaskaj parolantoj?

=====0000=====

V = 560

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: [<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>](https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/).

Aperintaj komunikoj legeblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>



REF en 2002 en Sikonda, Hungario. Kunvenejo por multaj denaskaj esperantistoj en pozitiva etoso kune kun nedenskaj infanoj, kiuj partoprenas tipe kune kun la gepatroj.

Tiuj aranĝoj donis eblojn por gepatroj diskuti la realecojn de familia kaj ĉiutaga vivo en kiu rolas Esperanto. I.a. ili laboris krei terminologion por la malkongresa dialekto de Esperanto. Praktike ĉiu REF naskas novan kantlibron!

Fotoj ĉi-paĝe: SMG.



Grupo el la Infana Kongreseto de 2001 en Zagrebo; ĉiu tie delonge estas plekreska!



Pri la komunikoj EKO:

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill@^{ĉe}gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolisto.